# Kongreso ĉe Ballarat: Vendredon, 5 – Dimanĉo, 14 Januaro 2024

| | Ven 5 | Sab 6 | Dim 7 | Lun 8 | Mar 9 | Mer 10 | Jaŭ 11 | Ven 12 | Sab 13 | Dim 14 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 07:00 | | **Matenmanĝo** (Sab 6 – Lun 8) | | | **Matenmanĝo** (Mar 9 – Jaŭ 11) | | | **Matenmanĝo** (Ven 12 – Dim 14) | | |
| 08:00 | | | | | | | | | | |
| | | | | | | | | | | |
| 09:00 | | Malfermo | **Hoan** / **Orl-ando** | **Hoan** / **Orl-ando** | **Tuttaga Ekskurso** (09:00–18:00) | **Hoan** / **Orl-ando** | **Hoan** / ***Orl-ando*** | **Hoan** / **Orl-ando** | **Hoan** / **Orl-ando** | **Adiaŭi**<br>**Bonan vojaĝon** (09:00–12:30) |
| 10:00 | | **Kafopaŭzo** | | | | | | | | |
| | | **Kafopaŭzo** (Sab 6 – Lun 8) | | | | **Kafopaŭzo** (Mer 10 – Sab 13) | | | | |
| 11:00 | | **Hoan** / **Orl-ando** | **Hoan** / **Orl-ando** | **Hoan** / **Orl-ando** | | **Hoan** / **Orl-ando** | **Hoan** / **Orl-ando** | **Hoan** / **Orl-ando** | **Hoan** / **Orl-ando** | |
| 12:00 | | | | | | | | | | |
| | | **Tagmanĝo** (Sab 6 – Lun 8) | **Komuna Foto-1** | | | **Tagmanĝo** (Mer 10 – Sab 13) | | **Komuna Foto-2** | | |
| 13:00 | | | | | | | | | | |
| 14:00 | | **Assange**<br>*Sandor* | **Irlando-2**<br>*Trevor Steele* | **UEA**<br>*Duncan Charters* | | **Kial mi estas?**<br>*Terry Manley* | **Vivo de koalo**<br>*David Ryan* | **Tatuoj en Vjetnamio**<br>*Hoan* | **Eo en Adelajdo + *Regulus***<br>*Andrew Woods* | |
| 15:00 | **Alveno, Registrado** (15:00–18:00) | **3ZZZ** | **Larissa & Oleg** | ***Imago***<br>*Alan Turvey* | | **2a Mondmilito**<br>*Charles* | **AEA+NZEA: Niaj estontaj rilatoj** | | **Rido-leciono**<br>Andrew S | |
| | | **Kafopaŭzo** (Sab 6 – Lun 8) | | | | **Kafopaŭzo** (Mer 10 – Sab 13) | | | | |
| 16:00 | | **Irlando-1**<br>*Trevor Steele* | **Energifontoj**<br>*Orlando* | **Katalogi/Scienco**<br>*Jonathan* | | **Geedzeco**<br>*Helen* | **Torino**<br>*Heather* | **Tipa esperantisto?**<br>*David Ryan* | **Estonteco de AEA** | |
| 17:00 | | **AEA-Jarkunveno** | **Taksio**<br>*Ewald Schick* | **3ZZZ legado** / **Mond-vojaĝo** *Dmitry* | | **Kantoj**<br>*Kam Lee* | **3ZZZ legado** | **E. kaj Hungario**<br>*István Szabolcs* | **Aŭkcio** | |
| 18:00 | **Vespermanĝo** (Ven 5 – Ven 12) | **Vespermanĝo** | | **Vespermanĝo** | | **Vespermanĝo** | | | **Bankedo**<br>**Dancado, Teatraĵoj, Foto-Konkurso** (18:00–22:30) | |
| 19:00 | | | | | | | | | | |
| | **Neformala babilado** | **Lud-vespero**<br>*Sandor* | **Vjetnama Vespero**<br>*Hoan & Huyen* | **Esperanto en la trinkejo**<br>*Sporting Globe* | **Esperanto-Filmoj** | **Kuba Vespero**<br>*Orlando* | **Dancado**<br>*Heather* | ***Viena E- Muzeo***<br>Bernhard | | |
| 20:00 | | | | | | | | | | |
| 21:00 | | | | | | | | | | |
| | | | | | | | | | | |
| 22:00 | | | | | | | | | | |

## Vendredo, 5-a Januaro

| | |
|---|---|
| 13:00 – 18 :00 | Registrado |
| 18:00 – 19 :30 | Komuna vespermanĝo |
| 19:30 – 22 :00 | **Neformala babilado** |

## Sabato, 6-a Januaro

| | |
|---|---|
| 07:00 – 08:30 | Matenmanĝo |
| **09:00 – 10:00** | **Malferma ceremonio** *(Estraro)* |
| 10:00 – 10:30 | Kafopaŭzo |
| **10:30 – 12:30** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Progresintoj** *(Hoan TRAN – Ĝojo)*<br>Tiu ĉi kurso celas helpi al lernantoj pli memfide uzi la lingvon, plifortigi sian gramatikon, utiligante diversajn ekzerco-tipojn kaj paroligajn aktivaĵojn.<br>**Spertuloj** *(Orlando RAOLA)*<br>*Rigardu la apartan programon sur paĝo 10.* |
| 12:30 – 14:00 | Tagmanĝo |
| **14:00 – 15:00** | **Julian Assange – Heroo aŭ fiulo?** *(Sandor HORVATH)*<br>Sandor esploros la vivon de Julian Assange, la historion kaj gravecon de WikiLeaks. Cetere, li pensas, ke Julian estas pli heroo ol fiulo. |
| 15:00 – 15:30 | **3ZZZ en Melburno: Kiel kontribui al nia Esperanta radio-programo** *(Franciska TOUBALE)*<br>La teamanoj de 3ZZZ foriras eksterlanden ĉiun jaron por ĉeesti diversajn kongresojn en julio kaj aŭgusto. Pro tio necesas antaŭprepari programojn. Unu el niaj eroj estas prezentado de verko originale verkita en Esperanto de iu aŭstralia verkisto. Ĉi tiun jaron ni elektis *Paradizo ŝtelita* de Trevor Steele. Ni registros la eltiraĵojn, kiuj estos elsenditaj poste. Do bonvolu helpi nin: venu legi la parton de unu el la roluloj de la romano. Samtempe vi konos la verkon de Trevor, se vi ne jam legis ĝin. Antaŭdankon pro via helpo. Amikajn salutojn. |
| 15:30 – 16:00 | Kafopaŭzo |
| 16:00 – 17:00 | **Irlando, smeralda insulo de sanktuloj, poetoj, kaj sangaj bataloj. Ĉu nun paca, sekulara respubliko? – Parto 1** *(Trevor STEELE) – per Zoom* |
| 17:00 – 18:00 | **AEA-Jarkunveno –** *partopreno ankaŭ per Zoom eblas* |

| | |
|---|---|
| 18:00 – 19:30 | Vespermanĝo |
| **19:30 – 21:30** | **Ludvespero – Venu kaj ĝuu kelkajn simplajn amuzajn ludojn** *(Sandor HORVATH)*<br>Sandor prezentos kelkajn simplajn ludojn kun simplaj reguloj.<br>Venu, ludu, ridu, ridegu, agu kiel infano kaj simple forgesu vian "normalan" vivon dum du horoj. |

## Dimanĉo, 7-a Januaro

| | |
|---|---|
| 07:00 – 08:30 | Matenmanĝo |
| **09:00 – 10:30** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Progresintoj** *(Hoan TRAN)*<br>**Spertuloj** *(Orlando RAOLA)* |
| 10:30 – 11:00 | Kafopaŭzo |
| **11:00 – 12:15** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Progresintoj** *(Hoan TRAN)*<br>**Spertuloj** *(Orlando RAOLA)* |
| ***12:15 – 12:30*** | ***Kongresa Foto 1*** |
| 12:30 – 14:00 | Tagmanĝo |
| **14:00 – 15:00** | **Irlando, smeralda insulo de sanktuloj, poetoj, kaj sangaj bataloj. Ĉu nun paca, sekulara respubliko? – Parto 2** *(Trevor STEELE) – per Zoom*<br>*Daŭrigo de sabato, 6a Januaro, 16:00* |
| **15:00 – 15:30** | **Lando kiun Oleh dezirus – Kion Larissa kaj Oleh postlasis en Ukrainio** *(Marumi Smith)*<br>Feliĉe, Larissa eskapis el la milito de Ukrainio en marto 2022, kaj aliĝis al siaj du filinoj, kiuj havas familiojn en Australio. Larissa estis aktiva instruistino de la angla lingvo, kreskigante du filinojn kun sia forpasinta edzo (morto 2016) Oleh Oleg. Li naskiĝis en Ukrainio, kaj estis rusa soldato en siaj 20-aj jaroj, poste akademiulo en metodaro kaj filozofio kaj translokiĝis al Lviv, Ukrainio. En tiu prezento, la Esperanta amikino de Larissa, Marumi Smith, esploros tion, kion ŝi kaj Oleh postlasis en Ukrainio. Estos iom da fokuso pri la plej dezirata monda sistemo, kiun Oleh esprimis en sia lasta eldonita libro kiu havas 1200 paĝojn. Liaj aliaj 16 libroj estis publikigitaj, plejparte en la rusa kaj ukraina lingvoj. Vi povas diveni, kian mondon li deziris. |
| 15:30 – 16:00 | Kafopaŭzo |
| **16:00 – 17:00** | **Energi-fontoj kaj medio-protektado: nuntempo kaj estonteco** *(Orlando RAOLA)* |

| | | |
|---|---|---|
| **17:00 – 18:00** | **La vivo de taksiŝoforo en Graz, Aŭstrio** *(Ewald SCHICK) – per Zoom*<br>Ewald priskribos kelkajn pecetojn de sia 25-jara laboro kiel taksisto |
| **17:00 – 18:00** | **3ZZZ – Legado por la radio** *(Franciska TOUBALE)* |
| 18:00 – 19:30 | Vespermanĝo |
| **19:30 – 21:30** | **Vjetnama Vespero** *(Hoan TRAN kaj Trinh Thuy HUYEN)* |

## Lundo, 8-a Januaro

| | |
|---|---|
| 07:00 – 08:30 | Matenmanĝo |
| **09:00 – 10:30** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Progresintoj** *(Hoan TRAN)*<br>**Spertuloj** *(Orlando RAOLA)* |
| 10:30 – 11:00 | Kafopaŭzo |
| **11:00 – 12:30** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Progresintoj** *(Hoan TRAN)*<br>**Spertuloj** *(Orlando RAOLA)* |
| 12:30 – 14:00 | Tagmanĝo |
| **14:00 – 15:00** | **La nuna stato de UEA: Universala Esperanto Asocio** *(Duncan CHARTERS) – per Zoom*<br>La nuntempa prezidanto de UEA parolos pri la nuna situacio de la organizaĵo, kelkaj problemoj kaj perspektivoj. Venu kun multaj demandoj. |
| **15:00 – 15:30** | **La povo de la imago** (*Alan TURVEY*)<br>Einstein diris, “Imagado estas pli grava ol scio. Ĉar scio estas limigita, dum imago enbrakumas la tutan mondon, stimulante progreson, naskante evoluadon.” Iu ankaŭ diris: Se vi povas imagi ĝin, vi povas atingi ĝin. Alan parolos pri la potenco de la imago, kaj ĝia ofte kaŝita kapablo krei ŝanĝon. Alan estas kontrolisto en la Aŭstralia Hipnoterapiisto-Asocio kaj helpas homojn praktike en iliaj vivoj per la uzo de la imago. |
| 15:30 – 16:00 | Kafopaŭzo |
| **16:00 – 16:30** | **Katalogi la bibliotekon ĉe Esperanto-Domo** *(Jonathan Cooper) – per Zoom*<br>Jonathan priskribos la taskon krei ordon el la iama ĥaoso de la biblioteko de Esperanto NSW, kun pli ol 2700 libroj. Li inventis katalog-kodaron speciale taŭgan por Esperanta librokolekto, kiu povos esti uzata kiel bazo de pruntosistemo por membroj. |

| | |
|---|---|
| **16:30 – 17:00** | **La filozofio de scienco** (*Jonathan Cooper) – per Zoom*<br>Scienco estas pli ol simpla esplorado de la universo; sed kio ĝi estas, esence? Kaj kial iuj sciencistoj parolas pri necerteco? Jonathan diskutos la ideojn de scienco, kaj (kompreneble!) trovos iujn paralelojn kun arto. |
| **17:00 – 18:00** | **Mia Esperanta mondvojaĝo** *(Dmitry LUSHNIKOV)*<br>En junio-aŭgusto 2019 Dmitry kaj sia filo faris ĉirkaŭmondan vojaĝon. Dum 47 tagoj ili vizitis 18 landojn kaj 36 urbojn. Esperanto estis grava parto de la vojaĝo. |
| **17:00 – 18:00** | **3ZZZ – Legado por la radio** *(Franciska TOUBALE)* |
| 18:00 – 19:30 | Vespermanĝo |
| **19:00 – 21:00** | **Esperanto en la trinkejo**<br>Ni renkontiĝu en la trinkejo "***Sporting Globe***" (201 Mair Street, Ballarat Central), havu bonan tempon kaj espereble parolu kun kelkaj lokaj homoj pri Esperanto. Helpu reklami la eventon. |

## Mardo, 9-a Januaro

| | |
|---|---|
| 07:00 – 08:30 | Matenmanĝo |
| **09:00 – 17:00** | **Tuttaga ekskurso** |
| 18:30 – 19:30 | Vespermanĝo |
| **19:30 – 21:30** | **Esperanto-filmoj** |

## Merkredo, 10-a Januaro

| | |
|---|---|
| 07:00 – 08:30 | Matenmanĝo |
| **09:00 – 10:30** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Progresintoj** *(Hoan TRAN)*<br>**Spertuloj** *(Orlando RAOLA)* |
| 10:30 – 11:00 | Kafopaŭzo |
| **11:00 – 12:30** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Progresintoj** *(Hoan TRAN)*<br>**Spertuloj** *(Orlando RAOLA)* |
| 12:30 – 13:30 | Tagmanĝo |

| | |
|---|---|
| **14:00 – 15:00** | **Kial mi estas ĉi tie?** *(Terry MANLEY) – per Zoom*<br>Terry prezentos siajn praparencojn kiuj alvenis dum la amasa alveno pro oro en 1853. Per leteroj de praparenco de sia edzino Helen. Li iom esploros la eventojn tra tiu epoko. |
| **15:00 – 15:30** | **Plenkreskante dum la Dua Mondmilito** ***(Charles STEVENSON)*** *– per Zoom*<br>Charles prezentos kelkajn travivaĵojn en Viktorio dum la Dua Mondmilito |
| 15:30 – 16:00 | Kafopaŭzo |
| **16:00 – 17:00** | **Geedzeco** *(Helen PALMER)*<br>Ni kune esploros la pasintecon, la nunan tempon kaj la estontecon de geedzeco. |
| **17:00 – 18:00** | **Rigardo ĉe kantoj laŭ lirikverkista vidpunkto** *(Kam LEE)*<br>La prezentado temos pri la lirikoj de modernaj rokmuzikaj kantoj, rilate al evoluado de la temo, uzo de rimo, kaj aliaj aferoj. Tri el la kantoj estas originale verkitaj en Esperanto kaj alia estas traduko. La prelego estos utila por tiuj, kiuj deziras verki kantojn kaj tiuj, kiuj ĝenerale interesiĝas pri lirikoj en kantoj. La sekvantaj kantoj estos diskutataj:<br>1) "**Ni Estas Fortaj**" kantita de Jonny M Albumo: *Kreaktiva*:<br>youtu.be/C7-xk6He0nM<br>2) "**Vertiĝo**" verkita de Martin Wiese, Ludita de Martin kaj talpoj, Albumo: *Vestiĝo*: youtu.be/WbxkRaSorVA<br>3) "**Amata Venu**" Kantita de Larisa, Albumo: *Ludu kaj Kantu*:<br>youtu.be/93tnOPFyJUw<br>4. "**Mozaiko**" – Kjara (Chiara Raggi),Tradukado, Adapatado: Federico Gobbo, Albumeto: *Nuda*: youtu.be/gWTtpryE9GA |
| 18:00 – 19:30 | Vespermanĝo |
| **19:30 – 20:30** | **Kuba Vespero** *(Orlando RAOLA)* |

## Ĵaŭdo, 11-a Januaro

| | |
|---|---|
| 07:00 – 08:30 | Matenmanĝo |
| **09:00 – 10:30** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Progresintoj** *(Hoan TRAN)*<br>**Spertuloj** *(Orlando RAOLA)* |
| 10:30 – 11:00 | Kafopaŭzo |
| **11:00 – 12:30** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Progresintoj** *(Hoan TRAN)*<br>**Spertuloj** *(Orlando RAOLA)* |

| | |
|---|---|
| 12:30 – 13:30 | Tagmanĝo |
| **14:00 – 15:00** | **Vivo de koalo** *(David RYAN)*<br>Por multaj familioj dombestoj estas ĝenerale hundoj aŭ katoj. Tamen, kia estas vivo de dombesta koalo en Nov-Zelando? |
| **15:00 – 15:30** | **AEA kaj NZEA : Niaj rilatoj en la estonteco**<br>Kelkaj diskutendaj punktoj: Komunaj kongresoj? • Regula kunlaboro • ESK |
| 15:30 – 16:00 | Kafopaŭzo |
| **16:00 – 17:00** | **Bela Torino** (*Heather HELDZINGEN)*<br>Heather enamiĝis al Torino dum la lasta UK. Venu kaj ĝuu sian amon al tiu belega itala urbo. |
| **17:00 – 18:00** | **3ZZZ – Legado por la radio** (*Franciska TOUBALE)* |
| 18:00 – 19:30 | Vespermanĝo |
| **19:30 – 22:30** | **Cirkla Dancado** *(Heather HELDZINGEN)* |

## Vendredo, 12-a Januaro

| | |
|---|---|
| 07:00 – 08:30 | Matenmanĝo |
| **09:00 – 10:30** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Progresintoj** *(Hoan TRAN)*<br>**Spertuloj** *(Orlando RAOLA)* |
| 10:30 – 11:00 | Kafopaŭzo |
| **11:00 – 12:15** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Progresintoj** *(Hoan TRAN)*<br>**Spertuloj** *(Orlando RAOLA)* |
| **12:15 – 12:30** | **Kongresa Foto 2** |
| 12:30 – 13:30 | Tagmanĝo |
| **14:00 – 15:00** | **Tatu-kutimo de vjetnamoj en la antikva tempo** *(Hoan TRAN)*<br>Nuntempe tatuo estas tre populara kutimo aŭ hobio inter vjetnamaj gejunuloj. Ili pensas, ke tatui la korpon aŭ iun korpoparton estas maniero por montri sian fortan karakteron kaj ĝi estas importita kulturo de la Okcidento. Maljunuloj ofte pensas, ke tio ne estas bona hobio, kaj tiuj kiuj havas tatuaĵon estas ludemaj aŭ ne obeemaj. La fakto estas ke tatuado en Vjetnamio ekaperis jam dum la antikva tempo kaj ili eĉ havis sanktan signifon. En la prelego, mi prezentos kial vjetnamoj ekhavis tatukutimon, kaj la signifojn malantaŭ tiuj tatuaĵoj. |
| 15:00 – 15:30 | *(Anoncota)* |

| | | |
|---|---|
| 15:30 – 16:00 | Kafopaŭzo |
| **16:00 – 17:00** | **Kia estas tipa Esperantisto?** *(David RYAN)*<br>Ĉu parolantoj de Esperanto estas "ordinaraj" homoj? Kiel priskribi tipan Esperantiston? |
| **17:00 – 18:00** | **Esperanto kaj Hungario** *(István Szabolcs) – per Zoom*<br>Pli ol cent-dudek-jara historio kun du oraj periodoj – probable eĉ tri. Vojaĝo reen en la pasintecon helpe de filmetoj el la arkivo kaj per la helpo de la literaturo. Per tiu prelego komenciĝas ankaŭ la jubilea jaro: antaŭ cent jaroj, la 20-an de aŭgusto 1924, naskiĝis P-ro István Szerdahelyi, la fondinto de la 'Esperanto-Fako' en la Budapeŝta Universitato ELTE en 1966, kiun li gvidis ĝis sia frua morto en 1987. |
| 18:00 – 19:30 | Vespermanĝo |
| **19:30 – 20:30** | **La Viena Esperantomuzeo** *(Bernhard TUIDER) – per Zoom*<br>Bernhard, la teamestro de la Viena Esperantomuzeo, prezentos al ni la historion, la funkciadon kaj eventualan estontaĵon de tiu grandega kolekto de esperantaĵoj. Ni ankaŭ diskutu kion fari pri niaj Esperanto aĵoj. |

## Sabato, 13-a Januaro

| | |
|---|---|
| 07:00 – 08:30 | Matenmanĝo |
| **09:00 – 10:30** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Progresintoj** *(Hoan TRAN)*<br>**Spertuloj** *(Orlando RAOLA)* |
| 10:30 – 11:00 | Kafopaŭzo |
| **11:00 – 12:30** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Progresintoj** *(Hoan TRAN)*<br>**Spertuloj** *(Orlando RAOLA)* |
| 12:30 – 13:30 | Tagmanĝo |
| **14:00 – 14:30** | **Esperanto-agado en Adelajdo** *(Andrew WOODS)*<br>La loka legorondo kaj la sabataj lecionoj al studentoj de Azio fare de Trevor Steele |
| **14:30 – 15:00** | **La romano *Regulus* de Lorjak** *(Andrew WOODS)*<br>Historia romano pri Parizo en la epoko de Luizo XIII |
| 15:00 – 15:30 | **Rido-Leciono** (Andrew SPANNENBERG)<br>Andrew instruos al ni kiel ridi sen kialo. |
| 15:30 – 16:00 | Kafopaŭzo |

| | |
|---|---|
| **16:00 – 17:00** | **La estonteco de AEA**<br>Venu kaj proponu viajn ideojn. |
| **17:00 – 18:00** | **Aŭkcio**<br>Donu aĵojn por la aŭkcio al Heather. |
| **18:30 – 22:30** | **Bankedo, Fotokonkurso, Atestiloj** |

## Dimanĉo, 14-a Januaro

| | |
|---|---|
| 07:00 – 08:30 | Matenmanĝo |
| **09:00** | **Forveturo: Bonan vojaĝon!** |

## Apendico: Programo por la Esperanto-kurso por spertuloj

| | | |
|---|---|---|
| ĉiun tagon | **9:00 – 10:30:** Profesoro enkondukas la temon por la tago, disdonas legmaterialojn, klarigas la celojn<br><br>**11:00 –12:30:** Grupa gvidata kunlaboro. La studentoj pritraktas la taskojn, skribas eseetojn kaj partoprenas parolajn diskutojn. | **Vespere:** Amuza programo. La studentoj preparas kantojn, teatraĵojn, podkastojn, filmojn, ktp, uzante la lernitajn materialojn. |
| vendredon<br>5 jan. | Enkonduko. La studentoj kaj la profesoro interkonatiĝas. Prezento de la programo por la kurso, klarigo de celoj kaj esperoj.<br><br>Mallongaj parolaj kaj skribaj ekzercoj – testoj por taksi la efektivan lingvan nivelon de la partoprenantoj. | Ni ludas "Demandu al mi ion ajn!" Sur la scenejo rolas profesoro O. Raola. |
| sabaton<br>6 jan. | Originala prozo en Esperanto. Enkonduko al la verko: *Ombro sur interna pejzaĝo* de Spomenka Štimec. Konatiĝo kun la aŭtorino. La historia fono de la romano.<br><br>Parolige: Elektu vian plej ŝatatan pecon de la verko kaj liveru tri minutan prezentadon pri ĝiaj kvalitoj.<br>Skribe: Kunmetu vian prezenton de la plej interesa fragmento en 1000-vorta eseeto. | Kunverki teatraĵon: Uzante vortojn kaj esprimojn troveblajn en *Ombro…* ni kunverku teatraĵon, absolute libera temo (povas rilati al la verko aŭ ne havi rilaton), kun diversaj scenojn, muzikon, ktp. |

| | | |
|---|---|---|
| dimanĉon<br>7 jan. | Originala poezio: La ĉefverko: *La infana raso* (LIR) de William Auld. Kial ni konsideras ĝin la mejloŝtono de la poezia arto en Esperanto.<br><br>Parolige: Trovu interesajn metaforojn kaj uzu ilin en simila kunteksto.<br>Skribe: Priskribi la sentojn kiujn inspiras la legadon de *LIR*. | Deklamado estas arto. Parkerigi kaj teatre deklami pecojn de la *LIR*. |
| lundon<br>8 jan. | Historio de radioelsendoj en Esperanto. Nuntempo kaj estonteco. Pola Interreta Radio (antaŭe Radio Polonia). Radio Havano Kubo. Esperanta radio en Aŭstralio. Podkastoj: La nova radio. (kern.punkto.info https://kern.punkto.info)<br><br>Parolige: Pretigado de radiointervjuo.<br>Skribe: Artikole raporti pri/por intervjuo. | Kunmeti (munti) kaj aŭdigi diversajn pecojn de radioelsendoj. |
| mardon<br>9 jan. | La esperanta gazetaro. La revuo Monato.<br><br>Parolige: La studentoj prezentas la plej ŝatatan pecon troveblan en la kolektoj de Monato, kaj pridiskutas, kial oni elektis tiun pecon.<br><br>Skribe: Verku (individue aŭ grupe) artikoleton por Monato. | Muziki en Esperanto |

| | | |
|---|---|---|
| merkredon<br>10 jan. | Ekskursa tago | |
| ĵaŭdon<br>11 jan. | Uzo de Esperanto en scienco kaj tekniko: Amri Wandel: *La kosmo kaj ni*<br>AdE: *Aliroj al Esperanto.*<br>Parolige: Scienco en mia vivo<br>Skribe: Raporto pri la plej interesa scienca novaĵo aperinta en 2020-2023 | Ludoj kaj Lerniloj (surtablaj, komputilaj) |
| vendredon<br>12 jan. | Esperanto ekster Eŭropo: *Mi vizitis grandan urbon* de G. Koffee, *Nia Ameriko* de J. Martí en traduko de O. Raola<br><br>Parolige: Interparoloj kun alikontinentaj amikoj<br>Skribe: Ĉu ankoraŭ ekzistas leteroj de plumamikoj? | La tradicio de internaciaj artaj vesperoj en Esperanto-aranĝoj |
| sabaton<br>13 jan. | Teatro kaj Kinoarto en Esperanto. Esperanto en youtube kaj similaj kanaloj.<br><br>Parolige: Prezentu nian kursaron al la mondo per youtube. Unuminutaj filmoj.<br>Skribe: La verkado de filma scenaro estas ankaŭ arto. | Film-festivalo |